

ESPERANTO-MIDI-PYRENEES (FEDERACIO) JARRAPORTO DE LA JARO 2016-2017

1. Regiona kunordigado

Membraro (kluboj, individuoj) kaj evoluo...

Federaciaj kunsidoj, kongresoj...

Rilato kun UFE, partopreno en landaj instancoj (ekz. interfederacia konferenco)...

La membraro malkreskis de 109 ĝis 86 (18 el CEEA, 50 el EKC, 12 de Esperanto-Tarn plus 12 individuaj membroj de UFE, deko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono).

La asocio ne estis reprezentata dum la **3 ufe-komitatkunvenoj** de 2016-2017.

Estis **3 kunsidoj en Arrout** antaŭ aŭ post la staĝoj por ĉefe interŝanĝi informojn. Krom en Oktobro, aperas artikolo por raportoj pri ĝi en la portalo. [Réunion des actifs de la région](#) (Marto)
[Raporto pri federacia kunveneto](#) (Junio)

Nia jarkunsido okazis la 11/12/2016 en Foix, okaze de la Esperanto-festo. Partoprenis 13 personoj, el 4 departementoj. Unu nova persono (Françoise) aliĝis al la komitato.

En la **komitato** membras Françoise Eriksen (31), Véronique Bichon (09), Alain Casiez (09), Jorgos Comte (09), Gilbert Darrieux (65), Marc Roger (31), Marion Quenut (31), Bernard Legeay (12), Michel Metzger (81), Christophe Chazarein (31) et Francis Bidault (81)

Marion sendis la konvokilojn kaj redaktis kaj kolektis la raportojn

Fine de septembro, okaze de la veno de Tim Morley en Tuluzo, ni venigis 2 membrojn de la federacio Languedoc-Roussillon, estis interesaj interŝanĝoj pri niaj federacioj, kaj pri eblaj komunaj projektoj.

2. Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo...

Informa materialo...

Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)...

Partopreno en landskalaj kampanjoj...

Nia asocio havas **informbultenon** kiu aperis nur unufoje (Januaro) de la « Cirkulero de Midi-Pyrénées », interna **bulteno**, sendita kutime rete (papere al tiuj sen retadreso). Tiu ĉi estis sendita al ĉiuj membroj, kune kun la Krokodil' de EKC ; pasintjare, nia asocio pagis por la sendado, kaj ĉi-foje EKC pagis la printadon.

Niaj retaj paĝoj kuŝas en la **portalo** <http://Esperanto-midipyrenees.org> . Estas paĝoj pri la federacio, paĝoj laŭ departemento, paĝoj laŭ asocio, kaj aparta blogo por la Cirkulero. En la cirkulero, publikiĝis 12 artikoloj en 2017. Marion respondecas pri ĝi.

Ĉar la portalo maljuniĝas kaj la adreso ne plu taŭgos, estas projekto fari **novan portalon regionokcitani-skalan**. Se ili ricevos mandaton de ambaŭ federacioj (EKC jam konsentis), Marion kaj Florian el Montpellier pretas labori pri la projekto. Ili jam rete renkontiĝis 2-foje por paroli pri la projekto.

Ne estis aparta ago de nia federacio por **konigi Esperanton en la regiono** (en la departementoj sen asocioj, kiel antaŭ pluraj jaroj en Montalbano kaj Kadurko). Ĉi-jare, denove ne estis stando en Bio Synergie, en Montalbano, pro manko da homfortoj kvankam estas esperantistoj surloke. Menciinda Esperanto-prezento de Marion en Marciac (Gers, 32) en Aŭgusto.

3. Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj...

Ekzamensesioj federaciaj aŭ klubaj, nombro da ekzamenitoj...

Kursoj pli malpli regule okazas iniciate de lokaj asocioj. Tri **semajnfinaj kursoj** okazis en Arrout (Arieĝo), organizitaj de EKC (inter 15 kaj 23 partoprenintoj).

En Tarno, estas kurso kun 6 personoj en Graulhet.

En Tuluzo kaj Arieĝo, vidu la apartajn raportojn de EKC kaj CEEA.

En Tarn et Garonne, esperantisto kadre de « Les Francas » gvidas plurajn atelierojn por infanoj kaj plenkreskuloj.

4. Kulturo kaj aranĝoj

Prelegoj, prelegturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj...

Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj...

La **tradicia Esperanto-Festo** kunvenigis en Foix, la 10an kaj 11an de decembro 2016, kvindek da esperantistoj el la regiono, kelkajn neesperantistojn, por atelieroj, vizito, koncerto, spektado de filmoj, debato, foiro de asocioj, libroservo.

http://www.esperanto-midipyrenees.org/articles/dossier.php?val=405_kelkaj+vortoj+pri+esperanto-festo+2016

Esperanto-Tarn jam kandidatiĝis por organizi la Esperanto-feston 2018 en Graulhet.

Pri aliaj aranĝoj kaj agadoj en Tuluzo kaj en Arieĝo, vidu la raportojn de EKC kaj CEEA.

En Tarno, okazis tuttagan aranĝon en Majo en Lautrec.

Okazis kvara **Nomad'kurso** en septembro en **Pollando**.

Marion